Foje mi sidos...

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Foje mi sidos apud fenestro
Vesperon al unu demando dediĉos,
Kaj doloretos en brusto maldekstre
Ĉu, mi estis feliĉa?

Mi estos tre mirigita homo
Kaj koro al trankvileco cedos
Kiam komprenos mi akseomon,
Ke ankaû mi kredas.

Rf: Kiam malvarmo regos en mondo
Kiam nur vento vagadas sur stratoj
Mi al demando pri vivo respondos:
-Jes, mi estis amata.

Mi multon ekvidos kaj multon komprenos
Kiam post longaj sintrompoj amaraj
Mi al mi mem respondos almenaû
Jes, mi havis erarojn.

Foje mi sidos apud fenestro
Vesperon al unu demando dediĉos,
Kaj doloretos en brusto maldekstre
Ĉu, mi estis feliĉa?

Rf: